# LA INFORMILO

INFORMBULTENO PRI ESPERANTO
BULLETIN d'INFORMATION sur l'ESPERANTO

Editeur : FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
Eldonisto : ESPERANTO-FEDERACIO de ORIENTA FRANCIO
Maison des Jeunes et de la Culture - 27, rue de la République - F 54000 NANCY

Trimestriel - Nouvelle série n° 2 - 2ème trimestre 1973
Abonnement 1 an : 5 f.- Le numéro : 1,25 (1 jaro : 6 internaciaj respondkuponoj)

Vi legos en la Informilo n° 2

- Informoj en franca lingvo pri Esperanto en la mondo (1a-2a paĝoj)
- Nia kongreso - internacia renkontiĝo Nancy 5-6ajn de majo (3a paĝo)
- UFE aĉetis sian domon en Parizo. Ĝi bezonas vian helpon (4a paĝo)
- Regionaj informoj ( 2a-. paĝo .)
- Renkontiĝo en La Hingrie 26-27ajn de majo (4a paĝo)

Vous lirez dans la Informilo n° 2

- Informations en français sur l'Esperanto dans le monde (pages 1-2)
- Notre congrès - rencontre internationale - Nancy 5 et 6 mai (page 3)
- L'UFE a acheté sa maison à Paris. Elle a besoin de votre aide (page 4)
- Informations régionales (page. 2)
- Rencontre à La Hingrie 26-27 Mai (page 4)

## Informoj pri Esperanto en la franca lingvo

Ili utilu : - por informi neesperantistan publikon
- por kuraĝigi novajn lernantojn

Vi diskonigu ilin per ĉiaj rimedoj, inkluzive per komunikoj al via loka gazetaro.

- L'esperanto à l'Université - La Faculté des Lettres de Clermont-Ferrand vient de créer un examen d'esperanto (Attestation d'Etudes) de trois degrés différents, à l'instar de ce qui existe pour les autres langues vivantes enseignées. Chaque diplôme peut se préparer en un an. Une originalité : les candidats peuvent ne pas être étudiants ; aucun autre diplôme préalable n'est exigé ; seuls sont demandés les droits habituels d'inscription en novembre.
- L'esperanto aura-t-il droit de cité comme langue seconde dans les lycées ? - Avec le consentement du professeur Janton (professeur à l'Université de Clermont, dispensant actuellement des cours d'esperanto aux étudiants) le groupe de la ville de THIERS vient d'entreprendre une action auprès des candidats députés afin que soit mise à l'étude l'inclusion éventuelle de l'esperanto dans le programme général de premier et second cycle (auprès de l'espagnol, de l'italien, etc...).Cette requête viserait ainsi à faire du département du Puy-de-Dôme un département pilote et les résultats qui en découleraient pourraient servir de tests exploitables sur le plan national.

- Un nouveau jalon important dans l'édition française - Le professeur Janton annonce pour le printemps prochain la parution dans la célèbre collection "Que sais-je ?", d'un nouvel ouvrage intitulé "l'esperanto".

- Radio-Auvergne - Un "télé-cours" d'esperanto entièrement renouvelé est diffusé chaque vendredi à 19 H.30.

(sekvo sur la 2a paĝo).

- Vous ne recevrez pas La Informilo n° 3 si vous n'êtes pas abonné. Voyez abonnements et cotisations page 4.
- Vi ne ricevos la Informilon n° 3 se vi ne estos abonanto. Vidu abonojn kaj kotizojn, 4an paĝon. Esperanto-aktivuloj, kiuj reciprokas siajn informojn, ricevas senpagan ekzempleron.

- Un sondage interessant en Yougoslavie -Il portait sur l'attitude de la population à l'égard de l'esperanto. Les 4 questions suivantes étaient posées :
  1°/- Soutenez-vous l'intention de la télévision yougoslave d'insérer dans son programme un cours d'esperanto ?
  2°/- Désirez-vous que radio et télévision présentent mensuellement des informations sur le mouvement espérantiste en Yougoslavie et dans le monde ?
  3°/- Désirez-vous trouver des informations identiques dans vos journaux et revues ?
  4°/- Soutenez-vous l'intention de promouvoir un plus large enseignement de l'esperanto dans les écoles ?
(Il était suggéré, en plus de l'enquête, d'adhérer éventuellement au mouvement en qualité "d'ami de l'esperanto" avec contribution volontaire). Les résultats de ce sondage ont surpris les enquêteurs eux-mêmes. Sur les 60 communes-tests de Slovénie consultées, tous les maires soutiennent les 4 initiatives éventuelles. 44 communes sont devenues "amies de l'esperanto". 383 écoles élémentaires et 161 collèges et lycées ont accepté le programme dans sa totalité. 435 instituteurs et professeurs de 40 communes se sont inscrits au cours spécial par correspondance, aux frais des établissements, pour pouvoir à leur tour enseigner l'esperanto.

Tradukis por diskonigo al la franca publiko, post kompilado el la Esperanto-gazetaro : Pol DENIS.

---

En STRASBOURG :

- Nekrologo :Ni funebras pro la neatendita morto de nia kara samideano Heintz Marcel (72), kiu forpasis la 18an de decembro. De post 1925 li plenumis sindoneme plurajn postenojn en la loka kaj orient-franca Esperanto-movado. Pluraj gesamideanoj partoprenis la solenan mort-oficon kaj deponadis Florgarbon kun verda rubando, kun la surskribo : "La Esperanto-Amikaro". Ĉiuj, kiuj konis lin konservos dankeman memoron pri li.

- Kunvenoj : Niaj 1-aj kaj 3-aj mardaj kunvenoj estas rezervitaj al progresemaj parolad-kursoj, en lernejo Rotterdam farataj de S-ro Barido. La 2-ajn kaj 4-ajn mardojn ni regule kunvenas en la sidejo 1, place Mérian. La 12-an de decembro ni kunvenis por honori la naskiĝdaton de nia majstro D-ro Zamenhof. Nia prezidantino S-ino Grampp legis partojn el la vive de Zamenhof kaj poemojn de li verkitaj. Multaj Esperanto-libroj estis menditaj. Mardon la 23-an de januaro okazis la solena disdono de Esperanto-diplomoj :
- al S-ro Woerth Léon -(66) kaj al F-ino Daubinet Sylvia (16).

- Esperanto-kursoj : Dank'al propra iniciativo de la "Union Féminine Civique et Sociale du Bas-Rhin", kiu dissendis 500 cirkulerojn, iniciaj Esperanto-kursoj komenciĝis en Lycée Lucie Berger ĉiu-lunde vespere de post la 8-a de januaro, gvidata de S-ro ZIPFEL (20 gelernantoj).

- Esperanto-Kongresoj : Nia grupo partoprenos kiel eble plej multnombre al la orient-franca federacia kongreso en Nancy la 5/6-ajn de majo. 2 aŭ 3 geesperantistoj partoprenos la Universalan Kongreson dum aŭgusto.

F. ZIPFEL.

En EPINAL :

- Jam de la 12-a de oktobro 1972 funkcias la duagrada kurso. Ĉiuj miaj malnovaj lernantoj sekvis ĝin ĉiu-semajne, entute 9 personoj, kiuj bone laboras. Fine de la lasta jaro ni lernis la 12-an kaj lastan lecionon de la libro "Esperanto-vivant". Komence de la jaro, ni malfermis la libron "Ludoviko en Nederlando", ĉe la pliboniga parto.

Koncerne la duan kurson elementan, ĝi funkcias ĉiu-lunde en la sama loko, kun 10 gelernantoj. La 8-an de januaro ni vidis la 4-an lecionon. Tiuj lernantoj decidis lerni Esperanton, post vizito al la ekspozicio "La libro Esperanto". Do ĉi-tiu ekspozicio ne estis tute neutila. Ĝin vizitis 30 personoj. Malgraŭ la cento da invitkartoj, kiujn mi persone sendis al diversaj eminentuloj, neniu el ili venis, nur kelkaj sin senkulpigis. Ĉu vi pensas ke mi devas ion aldoni ? Tamen tiu rezulto ne malkuraĝigis min, sed mi opinias ke pli utilas la informo de buŝo al orelo, ol la informo per alia maniero.

Kiu ajn estu la rezulto, ni restu fidelaj kaj kredemaj je la fina celo.

M.BERGEROT.

En BAR-le-DUC : Post ekspozicio, kiun ĉeestis 200 personoj, malfermiĝis publika kurso. 8 gelernantoj diligente laboras. La loka E° klubo aliĝis al urba interasocio "Action Culturelle du Barrois", kio obligas pli efikan propagandon.

P. DENIS.

Tekstojn por la Informilo n° 3 vi bonvolu sendi antaŭ la 31an de majo al S-ro André GROSSMANN - Bât.D2, rue de la Doller - F.68110 ILLZACH.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

Federacia Kongreso kaj Internacia Renkontiĝo - Nancy 5 kaj 6ajn de Majo

Ĝis la 30a de marto, ĉirkaŭ 25 personoj aliĝis kaj 12 litoj estas rezervitaj. Aliaj interesatoj bonvolu nepre tre baldaŭe aliĝi, ĉar pro la Tutmonda Festivalo de Universitata Teatro, ni verŝajne ne povos disponi pri la antaŭplanitaj 50 litoj. Tre baldaŭ, ne plu estos ebleco tranokti en Nancy, eĉ en hoteloj. Do rapidu !

Manĝoj : Kelkaj personoj ŝajne hezitis reservi manĝojn. Malgraŭ la modesteco de la prezoj (la Junuldomo estas socia servo), la manĝoj estas bonaj. Vi povas do sentime rezervi ilin.

Programo : Pluraj gesamideanoj jam alvenos la vendredon posttagmeze. Ni interkonsentos kun ili pri la vespera programo vendrede : ĉu libera, ĉu promenado se bela vetero, ĉu lumbildoj kaj diskutoj.
- Sabate matene : partoprenos deko da personoj. Laŭ la vetero, aŭtomobila ekskurso ĉirkaŭ Nancy - aŭ programo de diapozitivoj kaj diskutoj.
- Por Sabato posttagmeze : ĉirkaŭ 20 aliĝintoj ĝis nun. Ĉiuj partoprenantoj provu alveni antaŭ la 15a horo. Se malbela vetero, ni vizitos la Lorenan Muzeon (regioneca historia kaj arta muzeo) dum 2 horoj. Se bela vetero, ni piede vizitos la malnovan urbon kun rapida vizito al la ĉefaj vidindaĵoj de la Muzeo. Tiuj vizitoj estos gvidataj de profesia gvidistino, tial ni petos etan monkontribuon de ĉiuj partoprenantoj. La prezo de la vizito estos proksimume 3 aŭ 4 fr. por ĉiu persono, inkluzive la enirprezon al la Muzeo mem. La rendevuejo por la vizitoj estos je la 15a30 precize antaŭ la enirejo de la Lorena Muzeo (Palais Ducal, Grand'rue, en la malnova urbo). Eblecoj parki sur stratoj "Jacquot" aŭ "de la Gendarmerie", apude.

La vespermanĝo en la Junuldomo okazos precize je la 19a30. Prezentado de la diapozitivoj pri Djerba -(S-ino OEHRI) okazos poste. Antaŭ la manĝo, kaj denove post "Djerba" nia amiko Pol DENIS prezentos al ni diversajn ludojn en Esperanto.

Kelkaj aliaj personoj ankaŭ preparis tutan repertuaron de ĝojaj rakontoj kaj kantoj. Laŭ la tempo disponebla, ni povos krome prezenti aliajn temojn de diapoj. Ni disponos pri riĉa programo de deko de diapo-serioj (pri Ĉeĥoslovakio, Primoŝteno, Nederlando, Svislando, Hispanio, k.t.p.).

La dimanĉa programo restas senŝanĝa. Post la 16a horo(fino de la diapo-prezentado pri Saharo) ni kompletigos la programon kiel sabate. Vespermanĝo okazos en alia restoracio por ankoraŭ deko da partoprenantoj.

La 25 jam aliĝintaj personoj venos el Verviers (Belgio) Mannheim (Germanio) Strasbourg, Bar-le-Duc, Epinal, Illzach kaj Nancy. Ni ĝoje akceptos pliajn aliĝontojn, sed por rezervi ĉambrojn vi treege rapidu nun !

J.P. COLNOT.

M E M O R U : "La suda enirejo de la Junuldomo, Strato Chopin, estas malfermita eĉ nokte"

-:-:-:-:-:-:-:-:-

ENKETO PRI ESPERANTO : Pluraj samideanoj mem respondis al la opinio-sondo. Ni memorigas al ĉiuj ke la celo de tiu enketo ne estas koni la opinion de esperantistoj ! La celo estas ke vi demandu pri Esperanto al viaj konatuloj, aŭ eĉ pli bone, al aliaj personoj kiuj ne, aŭ ne bone, konas nian lingvon. Samtempe vi kaptu la okazon por informi tiujn personojn pri Esperanto kaj pri ĝiaj atingaĵoj. La franclingvaj informoj aperintaj en paĝo 1 kaj 2 de ĉi tiu Informilo povos helpi vin.

Pri la rezultoj de tiu laboro bonvolu informi nin.

-=-=-=-=-=-=-=-=-

JAPON - Des Clubs et des cours d'esperanto existent dans plus de 70 Universités japonaises.

En FRANCE, des cours sont donnés dans 3 Universités (Clermont-Ferrand, Aix-en-Provence, Pau).

Norda Gazeto n° 1/73.

## Abonnements et Cotisations 1973

Si une étoile verte se trouve dans ce cadre (__) c'est que vous n'avez pas réglé votre abonnement ou votre cotisation 1973 à la date du 15 avril. Nos cotisations sont celles de l'UFE et de l'UEA, auxquelles est ajouté l'abonnement à "La Informilo" ; 5 fr.

Nous vous invitons à choisir une cotisation et à verser le montant correspondant à M. Jean CHAPELLIER, 109, avenue de la Malgrange, 54140 JARVILLE - CCP 399-75 NANCY.

| | Membres âgés de : moins de 22 ans | Membres âgés de : plus de 22 ans | Vous recevrez : |
|---|---|---|---|
| a)- Abonnement simple à "La Informilo"... | 5 f | 5 F | |
| b)- 1/- Membre adhérent (UFE & UEA)...... | 8 F + 5 f | 8 F +5 F | 1 & 2 |
| 2/- Membre titulaire "Junior"........ | 23 F + 5 F | [illegible] | 1 - 2 & 3 |
| 3/- Membre Titulaire (M.J.)........... | [illegible] | 88 F +5 F | 1 - 2 & 3 |
| 4/- Membre Individuel (M.J.)......... | 35,50 +5 F | 63 F +5 F | 1 - 2 - 3 -4- |
| 5/- Membre Individuel (M.A.)......... | 60,50 +5 F | 88 F +5 F | 1-2-3-4 & 5 - + 6(jusqu'à 25 ans). |

Selon la cotisation choisie vous recevrez :

1.- Carte de membre de UEA(pour les nouveaux adhérents) et feuillet 1973 de coupons, donnant droit aux services des 3500 délégués mondiaux.

2.- Bulletin trimestriel "La Informilo"

3.- Revue Française d'Espéranto (bimestrielle)

4.- Annuaire international (adresse des 3500 délégués mondiaux)

5.- Revue mensuelle de U.E.A. "ESPERANTO"

6.- Revue pour Jeunes "KONTAKTO" envoyée gratuitement aux membres JMA jusqu'à 25 ans.

NOTA - Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg, dont la trésorière est F-ino FIX Violette -13, rue Louis Apffel -67 STRASBOURG, sont priés de verser leur cotisation au "Centre Culturel ESPERANTO" CCP 499-17 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe, qui s'élève à 5 F.

---

## U.F.E. aĉetis nun sian domon en Parizo

Car nia nacia asocio troviĝis en kriza situacio (la posedanto de la domo,34, Strato Chabrol asignis UFE antaŭ Tribunalo por forpeli ĝin el tiu domo), estis necese trovi rimedon. La estraro de UFE decidis aĉeti domon, en kvartalo "Bastille", kiu tute kongruas kiel nia nacia Centro en Parizo. La kosto de la akiro estas ĉirkaŭ 120 000 F, UFE posedas nur 80 000 F. Necesas trovi rapide ĉirkaŭ 40 000 F. UFE alvokas al ĉiuj esperantistoj helpi ĝin per donacoj aŭ pruntoj. Donacoj libervolaj, pruntoj : minimume :2000 F. Tiu domo estas "nia domo" - Niavice ni alvokas al vi ĉiuj : donacu aŭ pruntu al UFE, pagante sumon al nia federacia kasisto, Sro CHAPELLIER (p.ĉ.k. NANCY 399-75). Por pruntoj, ni petas vin ne sendi malpli ol 100 F.Ne forgesu klare indiki kun via pago: "donaco" aŭ "prunto" por"domo UFE". Por tuj helpi UFE, ni tuj pagos el nia federacia kaso donacon je 200 F, kaj ni grupigos la pruntojn ĝis ni atingos 2000 F.

La Prezidanto :J.P. COLNOT.

- - - - - - - - -

FAMILIA RENKONTIGO EN LA HINGRIE : La Strasburga grupo denove organizos sian kutiman familian piknikan renkontiĝon en La Hingrie la 26an kaj 27an de majo. La Hingrie troviĝas ĉe ROMBACH-le-FRANC, apud LIEPVRE, en la valo inter Ste-MARIE-AUX-MINES kaj SELESTAT.

Ebleco tranokti, manĝoj el la sakoj aŭ ebleco mem kuiri en la familia domo.

Partoprenu multnombre tiun ripozigan renkontiĝon. Anoncu vin al S-ro F. ZIPFEL, 20, rue de Labroque - 67000 STRASBOURG.

---

Le Gérant :J.P. COLNOT - Imprimé par l'Office Municipal de la Jeunesse
20, quai Claude Le Lorrain - 54000 NANCY.